

Numero: 331.
Decembro 2019.

27-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly



Benitan Kristnaskon!

Ĉi numeron de Vesperto mi dediĉas por la infanoj. Nun nur fabeloj estos legeblaj en la gazeto.

Espereble vi komprenos min kaj ankaŭ vi legos la fabelojn.

Legi fabelojn kaj porinfanajn rakontojn estas grandioza afero. Ne forgesu, ĉiu estis infano kaj malpacience atendis Kristnaskon.

Por mi ĝi estis la plej bela festo en mia vivo. Kristnasko ĉiam ravis min, ĉar ĝi havas eksterordinaran atmosferon.

En la aero ŝvebas amo kaj ĝi ĉirkaŭbrakumas nin.

Certe ankaŭ vi sentis tion ĉi jam multfoje.

Laŭ mi la plej belaj kristnaskoj okazas infanaĝe. Tial mi deziras plibeligi tiun ĉi feston per kelkaj fabeloj.

Do, ankoraŭfoje mi deziras al ĉiuj legantoj de Vesperto benitan Kristnaskon kaj prosperan novan jaron por 2019!

— Redaktanto —



oo

La petego de la pinobranĉeto

Fore de la vilaĝo estis granda arbaro. Vintre la birdoj mutiĝis kaj multaj translokiĝis al pli varmaj regionoj. Kiuj restis, tiuj kaŝiĝis inter la arbustoj.

Antaŭ Kristnasko homoj estis en la arbaro kaj dehakis kelkajn pinarbojn kiuj estis portitaj hejmen.

De iu pinarbo defalis malgranda branĉeto sur la glacian neĝon.

La malfeliĉa branĉeto komencis kriegadi:

— Ne lasu min ĉi tie! Portu ankaŭ min al la vilaĝo! Ankaŭ mi volas vidi, kia estas la Kristnasko de la homoj. Mi petegas, ne lasu min ĉi tie!

Neniu aŭdis ĝian kriadon kaj petegon. La homoj ne komprenas la parolon de la arboj.

La malfeliĉa pinobranĉeto restis sur la tero.

Ĝi petis la leporon:

— Leporeto portu min al la vilaĝo!

— Mi ne portas vin, ĉar la homoj kaptas min.

Poste ĝi petis la vulpon:

— Kara vulpo, portu min al la vilaĝo!

— Mi ne portas vin, ĉar la homo havas mordeman hundon.

La pinobranĉeto petis helpon de ĉiu, kiun ĝi ekvidis en la arbaro. Eĉ li petegis ankaŭ al la vento. La vento priridis ĝin:

— Mi ne portas vin, ĉar ne tio estas mia tasko.

Fine la pinobranĉeto tre malgajiĝis kaj amare ploris. El la larmogutoj iĝis bele brilantaj globetoj.

Ĝi ne rimarkis, kiam almozulo iris preter ĝi. La almozulo ekvidis la pinobranĉeton kun la brilantaj globoj.

— Ho, kiom belega branĉeto! Ĝi jam estas ornamita.

Li levis ĝin kaj singardeme li metis en sian dorsosakon.

Ili longe iris tra arbaro kaj tra kamparo ĝis li atingis la finon de la vilaĝo, kie fluis rivereto. Super la rivereto estis ponto. Sub ĝi loĝis la almozulo kun sia edzino.

La virino ĝojegis ekvidante la pinobranĉeton.

— Kiom belega branĉeto. Ĝi estas vera kristnaska donaco kun la perloj de l' amo.

— AKB —



oo

Aŭdu! kantas anĝel-hor'

Angla originalo : Hark! the herald angels sing

Verkis (angle) Charles WESLEY, 1738

Aŭdu! kantas anĝel-hor':

"Nun naskiĝis la Sinjor'!

Pro kompat' pekulojn Di'

Repacigas nun kun Si!"

Homoj tra la tuta ter',

Resonigu tra l' eter'

L' anĝel-kanton pri la ven'

De la Beb' en Betlehem'!

KIEL SARA EKKONIS PAVLON



/DAŬRIGO DE LA RAKONTO ``MIRA
RENKONTIĜO``

Estis sunoplena sabata mateno. Aŭtuno prokrastiĝis. Pro sunaj varmetaj tagoj alloge kolektiĝis amase homoj por pasigi liberan tempon ekster la domo.

Naturo koloriĝas el helaj koloroj ĝis malhelaj sed varmaj koloroj kiel estas helflava aŭ malhelbruna aŭ malhelruĝa. La falintaj folioj flaviĝas kaj bruniĝas, sub viaj piedoj susuras. Tra branĉaro penetriĝas sunradioj varmigante malmultajn restantajn foliojn. Sur branĉaro oni ne vidas nestojn. Nur nubetojn blankajn krozantaj sur la blua ĉielo.

Sara ellitiĝante kuris al la proksima fenestro dezirante ke ŝi vidu kie estas ŝiaj amikoj. Ŝi trankviliĝis vidinte ilin eksteren. Tial ŝi rapidiĝis kun siaj matenaj devigoj. En la kuirejo jam estis preparita matenmanĝo. ``Do, ili jam manĝis`` ŝi konstatis kontente.

- Ah, kiel ili estas afablaj ``- diris ŝi laŭte preninte sandviĉon per du fingroj kaj kiun rida vizaĝmieno ŝmace manĝetis.

Antaŭ la ligna domo tri ursoj - la plej maljuna nomata Estro, mezalta urso Klaŭno kaj la plej juna urseto La grandokulo, ĝuis en ĝia matena miela porcio. La plej juna urseto, La grandokulo, lekadis ĝian malplenan ujon. La papilioj gaje flirtadas inter ili.

- ``Hodiaŭ, mi iros al la urba verda vendoplaco. Kara Estro, mi lasos niajn amikojn al vi. Vi devas prizorgi ilin vartante ilin ĉi-tie. Mi estas revenonta ĝis la kvina posttagmeze. Enorde, amikoj?`` diris ŝi akcentante ĉiun vorton. Ŝi gaje svingadis mane al ili anstataŭ saluto.

Jen, nia Sara pave paŝanta tra la urbaj stratoj. En ŝiaj manoj troviĝis plenplenaj du plaste plektitaj korbetoj. Ŝi estis kontenta, ĉar ŝi sukcesis aĉeti ĉion planitan, precipe ke ŝi sukcesis vendi varojn kunprenitajn de la domo.

``Estas frue, mi sidiĝu en la kafejokorto, ĉi tie mi atendos miajn geamikojn, Jana kaj Petro - ekpensis ŝi. Dirite farite.

Subite aperis kelnero. Ho, vi jam alvenis! Ĉu kiel ordinare? - demandis ŝin afable kelnero.

Jes, kiel kutime. Dankon - ripetis ŝi donacante al li la grandan ridon.

Sara ĝuante eltrinkis tason da nigra kafeo kaj scivole rigardis ĉirkaŭaĵon. Subite ŝi aŭdis ian kriaĉon. Ŝi streĉite aŭskultis. Ja, vere aŭdiĝis miksitaj viraj kaj

infanaj kriaĉoj. Ŝi mire turnis la kapon dekstren kaj reen maldekstren, sed nenio estis vidata. Ŝi daŭre estis mirigita eĉ paniko kaptis ŝin, sed vane. Nenio suspektinda okazis en ŝia proksimo, dum kriaĉoj iĝis pli kaj pli fortaj.

``Helpu nin!`` - ŝi klare aŭdis tion, eĉ tiu bruado nun plisoniĝis kiel ia forta tusado. Sara stariĝis maltrankvile faliginte unu el du korbetojn. Oranĝoj kaj kivioj disjetiĝis je ĉiuj kvar flankoj.

- ``Ho, kion mi faris!`` - diris ŝi malkviete. Ŝi kliniĝis preskaŭ genuiĝante por kolekti la falintaj fruktojn. En tiu momento ŝi ekvidis etendiĝintan manon preta helpi al ŝi.

- Pardonu, mi helpos vin. Bonvolu sidiĝi je via loko. Kvietiĝu. Nenio stranga okazas - li diris rigardante ŝin tre zorgeme.

- ``Ja, mi maltrankviliĝis pro la krioj. Ĉu vi ankaŭ aŭdis ilin?`` - demandis lin Sara ankoraŭ tremanta.

- Krioj ...?

Tiu momenton, forte ekaŭdiĝis krioj. - Ah, nun mi komprenas vin - diris li alpaŝante ĝis la sidloko de Sara.

- Tiuj kriaĉoj vin maltrankviligis! Sed vere ili estas falsaj! Ne zorgu, venu kun mi! Dirante tion li kaptis ŝian manon kaj fortiris ŝin al la proksima pasaĝo de kie venis fortaj kriaĉoj. Ili kune trapasis la pasaĝon, kiam antaŭ ŝiaj okuloj aperis teamo de surstrata ekzercado fare de la urba fajrobrigadistoj kunlaborantaj kun la infanoj el la apuda elementa lernejo.

- Tio estis regula aŭtuna ekzerco celanta montri, kiel savi homojn dum fajrobruligo - klarigis la nekonata junulo.

Vangoj de Sara ruĝiĝis. - Ja, pardonu... ŝi ne povis fini la diraĵon, ĉar ŝiaj amikoj, Jana kaj Petro gaje salutis la nekonatulon.

- Jen, kara amikino: tiu junulo estas nia bona konanto, la bona filo de la amikoj de miaj gepatroj. Pavle estas lia nomo. Li estis loĝinta ĉe miaj parencoj en Montenegro antaŭ kvar jaroj. Pavle vidu, tiu bela junulino estas nia bona amikino. Donu al mi viajn manojn - diris Jana kaptante la manojn de Sara kaj de Pavle.

- Estos ni la plej bonaj geamikoj, ĉu ne? Unu bela amikeco por la tuta vivo!

- Jes, gaje - diris Sara kapjesante. Ŝi kaŝe rigardis la blujajn okulojn de Pavle kun kontenta mieno.

Fino - estas daŭrigota

Miriĉ Jadranka - Zajeĉar - Serbio / Oktobro 2019



La kristnasko de museto

En la musotruo estis tomba silento, ĉar la timiga nigra kato de la dommastrino sidis antaŭ la truo.

Hodiaŭ ĝi ankoraŭ ne kaptis muson. La kato estis tre malsata je musoviando. Krome ankaŭ la dommastrino ordonis al ĝi kapti ĉi besteton.

Tiel vintre pro la frosta vetero la musoj invadis la domon. En varmaj sezonoj ili gaje kuradis sur la kampo kaj tie ili serĉis nutraĵon.

— Mi ne povas toleri plu — diris la museto. — Post kelkaj tagoj estos Kristnasko kaj ni ne povas vivi en paco pro la kato.

— Silentu! — flustris la aliaj musoj. — Ankoraŭ la kato ekaŭdos. Ni restu silente ĝis ĝi foriros!

— Kiom longe ni atendu? Ĉiutage nur atendi. Almenaŭ kristnaske ni povus vivi pace kaj trankvile unu kun la alia.

— La tasko de la kato peli nin. Neeblas fari ion kontraŭ tio. Ni devas akcepti tiun ĉi malgajan situacion.



— Mi ne konsentas. Mi deziras fari ion por ke almenaŭ kristnaske ni vivu pace kaj trankvile unu kun la alia — diris rezulte la museto.

— Kion vi deziras fari? — demandis scivole la aliaj.

— Mi parolas kun la kato, ke almenaŭ dum Kristnasko ne estu milito inter ni!

— Vi stultiĝis — diris la aliaj musoj. — La kato mangos vin. Ho, vi malfeliĉulo!

La museto ekridetis kaj ĝi iris pli proksime al la enirejo. Ĝi elkriis:

— Aŭskultu min, kato!

Unue ĝi ne ricevis respondon, ĉar la kato endormiĝis. La museto plurfoje vokis ĝin ĝis fine la kato levis sian kapon kaj mire demandis:

— Kiu vokis min? Mi vidas nenion.

— Mi estas la museto ĉi tie en la truo. Mi deziras paroli kun vi.

— Pri kio? — ekmiris la kato kaj ĝi ŝovis sian nazon pli proksime al la enirejo de la truo.

— Mi proponas pacon inter ni almenaŭ dum la festoj. Kial malamikiĝi, kiam alvenas Jesueto. Ankaŭ ni povus repaciĝi kaj kune festi la sanktan nokton.

La kato serioziĝis, ĉar ĝi ne sciis kion fari?

— La dommastrino ordonis kapti aŭ forpeli vin. Se mi ne obeos, tiam mi ne ricevos freŝan, varmetan lakton por matenmanĝo.



— Ankaŭ la dommastrino atendos Jesueton kaj mi garantias, ke ŝi ne koleros. Ŝi komprenos vin — diris la museto kaj ĝi atendis la respondon de la kato, kiu cerbumante sidis antaŭ la enirejo de la musotruo.

La musoj tremante kaj malpacience. Jam ankaŭ ili deziris la pacon. Ĝis nun ili ĉiam kuris de antaŭ la kato.

— La museto pravas, ni vivu pace kaj trankvile — ili ripetadis mallaŭte.

Ekstere la nigra kato ekstaris kaj per amikema voĉo ĝi diris:

— Mi pripensas la aferon. Ankaŭ laŭ mi vivi en paco estas pli bona, ol eterne militi. Sed kion mi faru, se mia dommastrino pelas min ĉasi. Se mi ne obeas, tiam mi ne ricevos freŝan lakton, eĉ ŝi forpelos min de la domo.

La musoj ne esperis, ke la museto sukcesis konvinki la katon.

Neniu kuraĝis elveni el la truo.

Alvenis Kristnasko kaj en la domo estis granda silento.

La dommastrino estis en la ĉambro kaj ŝi ornamis la pinarbon.



Ĉi tage la kato ne ekaperis antaŭ la musotruo. La musoj ne komprenis, kie ĝi estas.

En la pasintaj tagoj ĝi jam ĉiam sidis antaŭ la musotruo kaj kaŝrigardis la musojn. Sed nun ĝi ne alvenis.

La musoj venis el la musotruo kaj ili komencis kuradi libere kaj gaje.

La maljunaj musoj avertis la junajn:

— Estu singardemaj! Eble la kato kaŝiĝis kaj ĝi kaptos vin.

Neatendite laŭta vekriego aŭdiĝis el la alia ĉambro:

— Ni fuĝu! Venas la kato.

La musoj ĉiuj kuregis al la enirejo de la truo. Ili preskaŭ renversis unu la alian, tiel ili kuregis por tuj malaperi.

La sonĝo de l' pinarbo

En la frosta, vintra arbaro staris sola pinarbo. Ĉiuj arboj kaj arbustoj dormis. Ankaŭ la bestoj kaŝiĝis.

Komence la pinarbo revante rigardis la stelojn, kiuj akre brilis. Steleto trakuris sur la firmamento.



— Ho, kien vi kuras steleto? — demandis la pinarbo.
— Post kelkaj tagoj estos Kristnasko kaj mi deziras saluti la naskiĝantan Jesueton. Venu kun mi! — diris la steleto kaj ĝi kuris plu.

— Bedaŭrinde mi ne povas iri. Miaj radikoj profunde estas en la tero. Por ĉiam mi devos resti tie ĉi — ĝemis la pinarbo kaj fermis la okulojn.

Rapide ĝi endormiĝis. Ĝi havis strangan sonĝon. La pinarbo povis iri. Ĝi havis piedojn. Ĝi iris sur brila vojo kaj en la malproksimo ĝi vidis stalon, kiun homoj kaj bestoj ĉirkaŭstaris. Ili ĉiuj preĝis.

La pinarbo demandis:

— Kion vi faras tie ĉi? Kio estas tiu ĉi brilo?

— Ĉu vi ne scias? — miris iu el la homamaso. — Naskiĝis Jesueto. Ĉu vi ne aŭdis pri li?

La pinarbo estis konfuzita, ĉar ĝi aŭdis pri Jesueto, sed ĝi neniam pensis, ke en iu tago ĝi renkontiĝas kun li.



— Mi deziras vidi lin propraokule — diris la pinarbo.

— Unue diru unu preĝon kaj vi povos eniri — proponis la homoj.

— Mi ne scias preĝi — lamentis la pinarbo. — En la arbaro neniu instruis preĝi al mi.

— Tio ĉi estas problemo. Sen preĝo oni ne rajtas eniri la stalon.

— Kion mi faru nun?

— Rapide ellernu almenaŭ unu preĝon!

— Kiu povas instrui al mi preĝon?

— Iru al la vilaĝa pastro kaj li certe helpos.

La pinarbo kuris al la vilaĝa pastro, kiu afable akceptis ĝin.



— Mi volonte instruas al vi preĝon, sed nun mi estas tre okupita. Revenu post unu monato!

— Tio jam estos malfrue — malgajiĝis la pinarbo.

— Mi ege bedaŭras. Mi ne havas libertempon por instrui vin — rifuĝis la vilaĝa pastro kaj li eniris en la domon.

La pinarbo eksidis sur grandan rokon kaj ĝi ploris:

— Ho, Dio mia, tie en la alta ĉielo mi deziras ekvidi Jesueton el mia plena koro. Mi sincere diras tion al vi. Ĝi estas mia unusola peto al vi.

Tiam okazis miraklo. Subite akra lumo kovris la firmamenton kaj forta voĉo aŭdiĝis:

— Kiu preĝas tiel bele?

— Sinjoro mia, mi nur laŭte parolis — diris la pinarbo. — Ĝi ne estis preĝo, nur simpla petego.

— Vere la poetoj kaj pastroj verkas pli belajn preĝojn, sed la via venis el via koro. Do, vi rajtas iri al mia filo Jesueto.

Tiam la tutan pinarbon inundis ĝojego kaj ekiris al la stalo.

Ĝi vekigis je la parolo de la homoj, kiuj alvenis kun hakiloj. El ili iu diris:

— Rigardu, kiom admirinda pinarbo. Ĝin ni dehakos kaj hejmenportos. Ĝi estos starigita kaj bele ornamita en la ĉambro de la infano.

La koron de la pinarbo plenigis varmeco kaj amo. Ĝi sentis ĉi vespere, ĝi renkontiĝos kun Jesueto.

— Ŝaŝa —

